
ESPERANTO-INFORMILO



Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Foto: G. Hennemann, en majo '23
La fama "Lorelei" roko ĉe rivero Rejno

La juna eldono de la Esperanto-Infomilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: Ulrich Fellmann

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main**

www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 6. Juni 23

mardon, la 6-an de jun. 23

19:00 h per Zoom

Offene Sprachrunde

19:00 h per Zoom

Malferma babila rondo

Dienstag, d. 13. Juni 23

mardon, la 13-an de jun. 23

19:00 h per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

19:00 h per Zoom

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

Zoom-Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 20. Juni 23

mardon, la 20-an de jun. 23

18:30 h surloke

18:30 h

Sprachrunde: W. Ullmann

„Das Latein in unserem Leben“

18:30 h

Babila Rondo: W. Ullmann

„La Latina en nia vivo“

19:30 h

Vortrag: G. Hennemann

„Über den diesjährigen 100. Jubiläums-Kongress
DEK100 des Deutschen Esperantobundes“

19:30 h

Prelego: G. Hennemann

„Pri la ĉi-jara 100a jubileo kongreso GEK 100 de
de la Germana Esperanto Asocio GEA“

mardon, la 27-an de jun,23

ekde la 19h horo:

Senprograma samideana babila renkontiĝo

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Naskiĝtagoj

En junio festos sian naskiĝtagon:

- 03.06. Gundhild Schäfer
- 05.06. Dr. Wolfgang Schwanzer
- 17.06. Franziska Reichel

Ni kore gratulas!

Antaŭanoncoj:



Sabado, 17.06.23
12:00-16:00

ESF infotablo en la urbocentro ĉe Biebergasse, apud Rathenau-placo.
Ĉiuj bonhumoraj Esperantistoj estas bonvenaj, precipe tiuj kiuj pretas alparoli trapaŝantojn distrumpete kaj tamtami nian karan verdan lingvon



Mardo, 22.07.23
19:00

Prelego de konata Esperantisto el Kongo (kondice li sukcesas veni)
Kiel anoncote invitis ni S-on *Mana Namutema Brinson* el Kongo.
Mana vizitos Germanion en la lasta semajno de Julio kaj pretas prelegi pri la temo: „Kiujn planojn ni havas por plivigligi la agadon de Hans Bakker kaj de ĉiuj esperanto-mecenatoj ?
Subtitolo: Agrokulturo kaj edukado - ŝlosilo de la vivo.”

Esperanto kaj Resilienco – “Se vi serĉas homojn vi trovas atletojn”

Opinia eseo de Georg Hennemann

Resilienco estas kapablo de homoj adaptiĝi al malsimilaj situacioj aŭ la kapablo de sistemo adaptiĝi al transformiĝo. La esprimo estas uzata en diversaj kunteksto. Oni parolas pri **klimata** resilienco, **ekologia** resilienco, organiza resilienco, **psikologia resilienco** ktp.

Ekologia Resilienco En ekologio resilienco estas la kapablo de ekosistemo reagi al perturboj rezistante damaĝojn kaj ripariĝi rapide.^[1] Resilienco estas esenca trajto de **daŭripova** sistemo. Esenca trajto de daŭropovaj sistemoj (dt: nachhaltige Systeme) estas ilia **resilienco** kontraŭ detruaj influoj.

Estis por mi tre interesa la prelego de Bernhard pri Bahaismo kaj la rilato al Esperanto en kiu li i.a. asertas, ke ĉiu epoko havas sian propran profeton, do ke ekde Abrahamo viciĝas ĉie ajn konataj profetoj kiel Moseo, Jesuo, Mohamedo kaj ke en la hodiaŭa tempo la irandevana profeto “Bahá ‘u’l-laáh” (Bahaulao) estas la sendita de Dio kaj rivelacias la diajn verojn kaj la dian volon – sed ke principe ĉiuj monoteistaj religioj apogas sin sur la sama konvinko: Ke ekzistas ĉiopova kaj ĉioscia Dio, do ke finfine ekzistas nur unu mondreligio. Bahaulao: „La tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj“.

Mia plej ŝatata filosofo Petro Sloterdijk en sia libro “Vi devas ŝanĝi vian vivon” diras ke religio tute ne ekzistas, do eĉ ne unu, sed anstataŭ nur pli malpli efektivaj homaraj trejnadsistemoj por konservi aŭ plibonigi niajn imunsistemojn. En tiu kunteksto li parolas pri tri homaj imunsistemoj: la biologia, la politika-socia, kaj la metafizika. La fakto, ke ne ekzistas religioj li klarigas per ekzemplo de la antikva Olimpika festivalo, kiu simple povis esti reestablita post pli ol 4 mil jaroj laŭ sugesto de Barono Pierre de Coubertin en la jaro 1896. La origino de la antikvaj Olimpikoj estis verŝajne en la 2-a jarmilo a.K. kaj la kalkulo laŭ Olimpikoj estis mezuro de tempo ĉie en antikva Grekio. Tamen ili ne estis "sporta evento" en la moderna senco, sed religia festo omaĝe al Zeŭso, la patro de la dioj, kaj la reĝo Pelopso. En ilia glortempo, la ludoj daŭris kvin tagojn - la unua tago estis markita per ritaj ceremonioj kiel ekzemple konsekroservoj kaj la eniro de la atletoj, trejnistoj, juĝistoj kaj spektantoj en la sanktan arbareton de Olimpia. Krom la konkursoj – artaj konkursoj estis same gravaj. La fokuso ne estis sur sporto, sed sur la religia komponento. La torĉa stafetado ankoraŭ hodiaŭ reprezentas la sintezon kaj apoteozon de la kulte troigitaj olimpikaj ceremonioj. Dum la 1896 okazanta unua Olimpiado en Ateno la emfazo estis metita sur la malfermaj kaj fermaj ceremonioj, premioceremonioj kaj medaloj. En 1920 oni fariĝis la olimpikaj ringoj kaj la

ĵuro antaŭ la mallevita flago de la gastiganta lando estis enkondukita. En 1924 estis kreita olimpika saluto, en kiu la atletoj devis etendi sian dekstran brakon - gesto kiu diferencis nur iomete de la faŝisma saluto. En 1928 olimpika flamo estis ŝaltita unuafoje en Amsterdamo. La Olimpiado de Los-Anĝeleso en 1932 jam estis populara amasa evento tutmonde. La alia ekzemplo kiun Petro Sloterdijk pritraktas estas la novfondita eklezio de la Scientologoj. Scientologio estas aro de kredoj kaj praktikoj elpensitaj de la usona aŭtoro L. Ron Hubbard, kaj ĝia rilata movado. Ĝi estis diverse difinita kiel sekto, komerco aŭ nova religia movado. Ĝiaj adeptoj nomiĝas scientologoj. La plej granda eksponento de Scientology estas la Preĝejo de Scientologio, alcentrigita kaj hierarkia organizo bazita en Florido kaj Kalifornio, kvankam t.n. terapiistoj ekzistas sendepende de la Eklezio, kiuj agas en la tielnomita ‘Libera Zono’. Oni taksas la nombron da scientologoj je pli ol 40,000 tutmonde. Ankaŭ la Homaranismo de L.L. Zamenhof povus ja iam iĝi ‘religio’, se pli multaj homoj agnoskus siajn dek-du dogmojn.

Mi resumas: Kiam oni povas fondi novan pseudo-religion kiel faris Pierre de Coubertin kun la modernaj olimpikaj ludoj aŭ eĉ eblas elpensi novan religion kiel faris usona aŭtoro L. Ron Hubbard – kion alian celas religioj ol daŭre praktiki meta-fizikajn rutinojn kaj per tiuj praktikoj akiri pli bonan resiliencon? Fakto estas ke la t.n. religioj ne plu estas la solaj metafizikaj trejnadsistemoj ofertataj hodiaŭ kaj devas konkuradi kun aliaj tiaj sistemoj, alikaze ili perdas aprobon kaj precipe junuloj forturnas sin serĉante aliajn solvojn. Sed la celoj de ĉiuj trejnadsistemoj ĉiam estis kaj estos la samaj: Ni ĉiuj celas plibonigi niajn imunsistemojn kaj per tio ankaŭ nian resiliencon. Kaj en tiu pli larĝa senco ankaŭ aliaj movadoj kiel ekzemple la skolta movado aŭ eĉ la Esperanto movado por siaj adeptoj kaj membroj povus esti ilo por trejniĝi sian resiliencon.

Ligiloj: <https://www.telepolis.de/features/Loesch-t-die-Flamme-3417901.html>, http://multimedia.olympic.org/pdf/en_report_656.pdf
<https://silo.tips/download/der-olympische-fackellauf-claudia-lenssen>

Praktika ekzemplo pri AI – artefarita inteligento

de Fritz-Ferdinand L. Palatinus (TF)

En la lasta eldono de EI mi prezentis artikolon, en kiu AI-programo prezentis fantaziplenajn argumentojn pri elektroturoj kiel pejzaĝajn kulturvaloraĵojn, kiujn oni kun iom da bona volo povas konsente sekvi. Sed AI estas programumo, kiu ĉiam kun la sama senlaca algoritmo produktas dum malmultaj sekundoj senprobleme ankaŭ rindindajn, frenezajn, groteskajn kaj – je okazo – ankaŭ danĝerajn argumentoĉenojn el simpla titolo.

Pro montri ekzemplon pri retorike ruza, sed en la esenco ridinda resp. freneza argumentado, mi prezentas la sekvan eseon al vi, kiun mi ricevis, kiam mi proponis germana la titolon: „Blumenkohl als Symbol für Rechtsstaatlichkeit“. Tiu estas atentigo, ke la algoritmo kapablas konstrui logikon, kiu povas ŝajne estas facile kredinda, sed en la esenco iu stultaĵo. Do restu singarda! (Kiel lastatempe, mi aldonas la anglan originalon por eviti miskomprenojn, ĉar mia angla ne estas centprocenta. Krome mi promesas, ke mi ne plu trudos al vi plian AI-eseon)

Cauliflower as a symbol for the rule of law

The symbolism of cauliflower in association with the rule of law can be interpreted through multiple angles. At first glance, it may appear that there is no connection between the two. However, upon further examination, one can notice how the characteristics of cauliflower embody the qualities of justice and fairness that define the rule of law.

Firstly, the head of the cauliflower is made up of tightly packed buds that are arranged in a precise and systematic manner. This structure can be compared to the legal system, which is built upon a framework of well-organized laws, regulations, and procedures. This arrangement ensures that all individuals are subject to the same set of rules, without any bias or preference. The cauliflower's uniformity symbolizes the impartiality and consistency of the law, which treats all people equally regardless of their status, race, or social affiliations.

Moreover, the white color of the cauliflower can represent the purity and transparency of the legal process. The law is supposed to be transparent, in that every decision made by courts or legislatures is open to scrutiny and challenge. The white color also denotes the high standards of ethics and morality that are expected of legal professionals. Legal

Florbrasiko kiel simbolo por la regado de la leĝoj

La simbolecon de florbrasiko rilate al la regado de la leĝaro (germane: Rechtsstaatlichkeit) oni povas pri'esei el multspecaj flankoj. Je la unua rigardo ŝajnas, ke ne estas iu ajn ligo inter la du aferoj. Tamen post pli profunda ekzamenado oni povas rimarki, kiel la ecaro de florbrasiko enkorpigas la kvalitojn de justeco kaj honesteco, kiuj difinas la regadon de la leĝoj.

Unue, la kapo de la florbrasiko konsistas el firme kunpakitaj rozetoj, kiuj estas aranĝitaj en preciza kaj sistema maniero. Tiun ĉi strukturon oni povas kompari al la leĝara sistemo, kiu estas konstruita surkadre de bone organizitaj leĝoj, reguligoj kaj procedoj. Jena aranĝo certigas, ke ĉiuj individuoj estas metitaj sub la sama kolekto de reguloj, sen iu ajn antaŭjuĝoj aŭ preferoj. La uniformeco de la florbrasiko simbolumas la nepartieceon kaj koherecon de la leĝaro, kiu traktas ĉiun homon same, sen rigardo al lia statuso, raso aŭ sociaj enretiĝoj.

Plie, la blanka koloro de la florbrasiko povus reprezenti la purecon kaj malkaŝemon de la leĝaj proceduroj. La leĝaron oni supozas esti malkaŝema tiel, ke ĉiu ajn decido, kiun faras la jurkortumoj aŭ la leĝfarantoj, estas malferma al esploro kaj kontraŭargumentoj. La blanka koloro ankaŭ signalas la altajn normojn de la etiko kaj la moralo, kiuj estas postulata de la leĝumaj profesiuloj. Leĝumaj praktikuloj estas

practitioners are bound by codes of conduct and ethical guidelines, which require them to act with integrity and honesty, without indulging in any corrupt or unethical practices.

Furthermore, the cauliflower's ability to adapt and take different shapes can be linked to the flexibility and adaptability of the law. The law is not rigid or static, but instead, it evolves and adapts to the changing needs of society. For instance, as new technologies emerge, the law has to keep up with these developments and adjust its provisions accordingly. Additionally, the law must be able to accommodate diverse lifestyles, beliefs, and cultures, without compromising its core principles.

Finally, the cauliflower's hardy nature and resilience can be associated with the durability and resilience of the legal system. The law should be robust enough to withstand any challenges or threats that may arise, and it should continue to function even during times of crisis or uncertainty. For example, during natural disasters, wars, or pandemics, the legal system must remain operational to preserve order, stability, and peace.

In conclusion, while the idea of cauliflower as a symbol for the rule of law may seem unconventional, it is a thought-provoking analogy that highlights the essential qualities of justice, fairness, impartiality, transparency, flexibility, and resilience that define the legal system. The cauliflower's structure, color, adaptability, and strength can be compared to the framework, ethics, dynamism, and durability of the law, which are critical components of any just and democratic society.

katenitaj per statutoj pri konduto kaj per etikaj gvidlinioj, kiuj postulas, ke ili agadu kun fidindeco kaj honesteco, kaj sen indulgo al iu ajn koruptecajn aŭ maletikajn praktikojn.

Krome la kapablon de la florbrasiko adapti kaj alpreni diversajn formojn oni povas kompari al la flekseco kaj adaptokapablo de la leĝaro. La leĝaro ne estas rigida aŭ senŝanĝebla, sed male ĝi evoluigas kaj adaptiĝas al la ŝanĝantaj bezonoj de la socio. Por ekzemplo, kiam nova teknologio aperas, la leĝaro devas modernigi samgrade kun tiuj evoluoj kaj laŭe adapti siajn preskribojn. Aldone la leĝaro devas kapabli sin akomodi al diversaj vivstiloj, kredoj, kaj kulturoj sen perfidi siajn esencajn principojn.

Laste la malmola karaktero kaj rezistokapablo de la florbrasiko estas asociebla al la daŭreco kaj rezistokapablo de la leĝa sistemo. La leĝaro estu sufiĉe fortika por kontraŭstari ĉiujn ajn defiojn kontraŭ sia funkcieblo eĉ dum tempoj de krizoj kaj sencerteco. Por ekzemplo, dum naturaj katastrofoj, militoj aŭ pandemioj la leĝa sistemo devas resti funkcia por garantii ordon, stabilecon kaj pacon.

Konklude, dum la ideo de florbrasiko kiel simbolo por la regado de la leĝaro povus esti rigardata kiel eksterkonvencia, ĝi fakte estas analogio provokanta la pensadon, kiuj ĵetas la fokuson al la esencajn kvalitojn de la justeco: honesteco, nepartieco, malkaŝemo, flekseco kaj rezistokapablo, kiuj difinas la leĝan sistemon. La strukturo, koloro, adaptiĝebla kaj forteco de la florbrasiko estas komparebla al la kadraro, etiko, dinamiko kaj daŭreco de la leĝaro, kiuj estas nemalhaveblaj komponentoj de ĉiu justa kaj demokratia socio.

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Dum la instruado de kemio la instruisto skribas formulon al la nigra tabulo kaj diras:

- Kiel oni vidas, unu elektrono mankas. Kie ĝi estas?

La klaso silentas.

- Kie estas la elektrono?

Subite lernanto interrompas la silenton kaj laŭtvoĉas:

- Neniu forlasu la ĉambron!

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉifoje prezentas estas:

- 93. — Preĝejo proksima, sed Dio malproksima.

EVOLUO DE RELIGIO EN LA MONDO



Brilantaj aĵoj en
la Ĉielo.



Katoj



Homoj en la Ĉielo



Malpli da homoj en
la Ĉielo



Homoj asertantaj
ke ili venas de la
Ĉielo



Ĉu katoj
denove?



Sinjoro Mono



La Fluganta
Espageta Monstro

EL: <https://www.facebook.com/groups/shercoj/posts/1592674087504504/>

Enigmo(j)

Mankas nova enigmo, bonvolu provi solvi unu e la lastajn enigmojn 😊

Lasta paĝo

Patrina Lingvo (de Ulriko Felmano)

La patrina lingvo de Zamenhofo estis la jida, la patra: la rusa. Tamen, la plejmultularo ankoraŭ nomas lin "polo", kiu li laŭ neniu kutima kriterio estis.

Studkolego mia havis hungaran patron, kies lingvon li estis lernanta infanece, paralele al la germana lingvo, kiu estas sia patrino. Al siaj propraj infanoj li ankoraŭ sukcesis instrui la hungaran. Ilia patrino lingvo estis ankaŭ la germana, kiun ili hodiaŭ parolas kun ĉarma akĉento de la loka dialekto. Sed ili flue regas la hungaran, kaj ĝuas ferii en Hungarujo.

Svedino ĉe kiu mi vizitis kurson en Karlsruhe parolis al siaj infanoj nur svede, sed tiuj ŝajne opiniis, ke la sveda estas lingvo limigita al la patrino, ĉar ili ĉiam respondis nur en la germana, la lingvo de la ĉirkaŭa medio. Kiam ŝi eĉ petis "provu paroli svede" ili tamen respondis nur germanlingve. Kiam la familio la unuan fojon kune vizitis Svedujon, la infanoj senprobleme ekparoladis svede... eble nur tiam komprenis, ke la sveda ne estis sekreta lingvo de la patrino. La patrino tiom ĝojis pri tiu ŝanĝiĝo, ke ŝi ofte rakontis tiun aferon.

En Esperantofamilio, kiun mi konas, la infanoj lernis Esperanton kiel gepatra lingvo, ĉar tiu estis la sola, kiun ambaŭ gepatroj flue parolis. La patran japanan lingvon ili ne lernis, sed la patrinan... tamen, ne rekte de la patrino, sed de parencoj de la patrino, kiuj ofte kunvivis en la familio kaj vartis la infanojn.

Ĉu oni nomu la polan lingvon patrinan, kvankam ties personecajn specialaĵojn venis de aliuloj, estas tikla demando.

Zamenhof iam skribis, ke la polan lingvon li plej ŝatis de ĉiuj lingvoj, kiujn li konis, kvankam li nur vere lernis ĝin post kiam li atingintis la 16-an vivjaron. Ĉu tio veras, aŭ ĉu nur estis kompleza diro direktita al la homoj, en kies lando li post la translokiĝo al Varsovio vivis, pri tio oni verŝajne ne povas certi. Pli frue li nomis la rusan la plej ŝatatan lingvon, sed tio ŝanĝiĝis post la rusaj antijudaj agoj kaj la pogromo, kiun Zamenhof mem spertis. Nomi la patrinan lingvon sian plej ŝatatan li certe saĝe ne aŭdacis - la ĝenerale kontraŭjuda sinteno de la tiama tempo tion malhelpis. Sed iam li skribis, ke la jida lingvo estas la lingvo de lia koro.

--